

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 821188

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

DE TWEEDE PERSOON

In het rijtje der persoonlijke voornaamwoorden staan ze vlak bij elkaar: *u* en *jij*. Doch toegepast staan ze soms mijlen ver van elkaar verwijderd, behoren ze elk tot een andere wereld, en tussen deze twee werelden ligt een kloof, die op enkele plaatsen heel smal, elders onoverkomelijk breed is.

Geeft *u* enerzijds eerbied en achting te kennen, die men aan een oudere of meerdere verschuldigd kan zijn, anderzijds is het neutraal-beleefd tegenover vreemden en tegenover bekenden, met wie men niet op vertrouwelijke voet verkeert. *Jij* daarentegen duidt op gemeenzaamheid tussen gelijken, maar ook op jeugd en ondergeschiktheid van de aangesprokene.

In mijn jeugd spraken de kinderen hun ouders aan met *u*, en het gebruik van dit woordje steunde m.i. hun gezag over ons en het ontzag, dat wij voor hen hadden. Tegenwoordig leren de kinderen *jij* en *jou* tegen hun vader en moeder zeggen, hetgeen volgens de voorstanders er van een sfeer van vertrouwen scheidt tussen ouders en kind, zonder dat gezag en ontzag in het gedrang komen. 't Is mogelijk; ik kan er niet over oordelen.

Het Opperwezen wordt in gebeden meestal met *U* aangesproken:

„Tot U wend ik mij met al mijn bekommernissen, o, Heer!”

Doch hier en daar heb ik — bij boerenmensen — ook *Jij* horen gebruiken:

„Geen woorden zijn in staat Jou te bedanken voor alles wat Je ons vandaag in Je goedertierenheid hebt geschonken.”

„Gemeenzaamheid met God”, zo werd me dit laatste uitgelegd.

Het gebruik van *u* en *jij* is van verschillende omstandigheden afhankelijk, ook hoe het ons in de oren klinkt: *u* kan soms uit-de-hoogte of te deftig, en *jij* opdringerig of te familiaar zijn, terwijl beide in bepaalde gevallen zelfs kunnen krenken.

„Willen we maar *jij* en *jou* tegen elkaar zeggen?” vraagt de jongen aan het meisje, als het „zover” is.

Doch in een andere verhouding horen we:

„Wat *jij*? Ik ben niet met je op school geweest!”

Hier heeft de aangesprokene de verschuldigde afstand uit het oog verloren. Mogelijk is de ander wel met hem op school geweest, doch wenst hij daar niet aan herinnerd te worden.

„Jullie? Jullie is jodenvolk!” is eveneens een gezegde, waarmee men zich tegen familiariteit keert.

Een collega, wie ik om zijn vakkennis grote achting toedroeg, ben ik altijd blijven aanspreken met *u*, hoewel dit onder ons helemaal niet gebruikelijk is. Maar dat ging vanzelf zo.

„Jonge vriend! Toen ik op jouw leeftijd was, zorgde ik, dat ik behoorlijk mijn brood kon verdienen, voor ik aan een meisje dacht!”

Geen enkele „jonge vriend” zal zich door dit *jouw* beledigd gevoelen of daaruit de gevolgtrekking maken, dat nu ook hij tot zijn wijze raadgever *jij* mag zeggen:

Maar hoe voelde ik me als kind eens hevig verontwaardigd, toen de professor in het ziekenhuis mijn moeder toesprak met *jij*:

„Die jongen van je moet eens naar buiten. Wat zeg je? Kan je dat niet betalen?”
Zou hij tegen „deftige mensen” ook zo gesproken hebben?

„Had u tegen hem ook maar *jij* gezegd”, zei ik tot mijn moeder, toen we weer op straat liepen.

Ja, daar zit 'm de kneep. De professor meende zich dat tegenover iemand uit de „mindere klasse” te mogen veroorloven, doch zou het omgekeerde niet dulden.

„Zeg, mag ik dat boek van jou eens lenen, waarover je het laatst had — hoe heet het ook weer?”

Ik keek even verrast. Met de spreker werkte ik samen voor een gemeenschappelijk doel. Hij was echter niet met mij op de haveloze school geweest en had het in het leven verder gebracht dan ik. Maar wij konden heel goed met elkander opschieten en zijn plotseling *jij* en *jou* klonken mij niet onaangenaam in de oren. Doch de ervaring had mij reeds wantrouwend en voorzichtig gemaakt: Zou het echt zijn? Even proberen:

„Ja, dat kan”, antwoordde ik, „kom je het halen, of zal ik het de volgende week meebrengen, als ik bij jou kom?”

Helaas, het bleek mis met hem:

„Nee, ik heb er geen haast mee. Ik wacht wel, tot u bij me komt.”

Dit gegoochel met *u* en *jij* was een kort, maar hevig drama. Onze normale verhouding, die een ogenblik van haar ankers had dreigen los te slaan, werd door zijn antwoord nog eens extra stevig vastgelegd.

Thans kan ik om zulke bekrompenheid lachen, maar destijds heeft dit voorval mij diep gegriefd en teleurgesteld. Zou hij, een man van ontwikkeling, begrepen hebben, dat hij zich van een heel lelijke zijde had laten zien, en dat er tussen ons iets geknakt was, dat nooit meer goed kon worden?

Was hij maar *u* blijven zeggen!

Standsvooroordeel schijnt onuitroeibaar — alle idealen van wereldbroederschap e.d. ten spijt. Zelden slaagt het er in zich te verloochenen, en daarom blijft waakzaamheid geboden. We kunnen met het kiezen van een „tweede persoon” niet te voorzichtig zijn. Het gebruik van *u* en *jij* is niet in alle talen precies gelijk, maar wel is het overal een behendigheids spel.

Daarom hulde aan Dr. Zamenhof, die zich ook op dit gebied democraat toonde. Hij gaf voor de tweede persoon slechts het woordje *vi*, te bezigen *door* iedereen *tot* iedereen. Het betekent noch *u*, noch *jij*; het is zowel beleefd als gemeenzaam; het kan niemand verheffen en niemand vernederen.

Ci is nooit in gebruik geweest. Het dient alleen maar, als — b.v. in een vertaling — van het jijen-en-jouwen zelf iets gezegd moet worden.

Om met Kalocsay te spreken: Zamenhof heeft *ci* dadelijk bij de geboorte de nek omgedraaid. En dat is maar goed ook.

F.F.

PRI LA DIFTONGO „OU”.

Pri nia mallonga klarigo koncerne la prononcon de „ou” (kiel *ou* en *Gouda*) ne sam-opinias k-do B. en H. Liaopinie ŭ estas konsonanto, prononcenda ŭo (egala al *bo*, *co*, *do* k.t.p.), kaj „poŭpo” do estas trisilaba vorto, prononcenda: *po-ŭ-po* (*po-oeo-po*). Per tio k-do B. opinias la problemon solvita.

K-do B. tamen miskomprenis nian klarigon. La problemo ne estas la prononco de „ou”, sed la demando, ĉu ni rajtas kombini en Esperanto *o* kun *ŭ*, same kiel *a* aŭ *e* kun *ŭ*. Tia kombino estas tre natura, sed... Zamenhof donis nur du diftongojn. Ĉu ni kreu trian? Nur Zamenhof mem povus solvi tiun problemon. *

Ankaŭ pri la prononco k-do B. eraras. Certe, la sola litero ŭ estas prononcata ŭo, same *bo*, *co* k.t.p. Sed, same kiel la konsonantoj ankaŭ ŭ ne havas tiun o-finaĵon en la vortoj mem. En vorto „ou” do povas soni, analogie al „aŭ” (*aw*) kaj „eŭ” (*ew*) nur kiel *ow*. Kaj tiu sono estas fonetike la sama kiel *ou* en *Gouda*.

Dem.: Kiel traduki la malajan vorton „sawah”? Ĉu: „savao” aŭ: „sawaho”? La traduko „subakvigita rizokampo” ja ne estas uzebla, precipe se la esprimo ofte ripetiĝas en la teksto.

Resp.: Por tiu signifo oni bezonas neologismon; „savaho” ŝajnas al ni la plej rekomendinda; la vorto jam estas uzita en „Kulio”. Oni nepre evitu la literon „w”, kiu en Esperanto ne ekzistas.

Dem.: Kiel traduki „Zij viel op de knieën”?

Resp.: La kutima traduko estas „ŝi falis sur la genuojn”. Logika tio ne estas, ĉar oni ne falas sur la genuojn, sed per la genuoj sur la plankon. Se oni do preferas logikan tradukon, ni konsilas: „ŝi genufleksis; ŝi ekgenuis” aŭ, se efektive ŝi falis: „ŝi falis genue; ŝi falis genuflekse”.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:

BEPALINGEN VAN GESTELDHEID.

Vermoeid van de lange wandeling keerden wij huiswaarts. Nadat wij gegeten hadden, gingen wij naar bed. De onderwijzer was van mening, dat de taak te moeilijk was. Ik gaf het costuum ongedragen terug. Ik kocht het ongedragen costuum. De kat likte zijn haren schoon. Wij hoorden de honden blaffen. De vergadering koos hem tot voorzitter. Moeder schonk de theepot leeg. Jan liet de lege theepot vallen.

Vertaling van opgave 9.

Du amikoj renkontis unu la alian¹⁾ sur la strato. Johano promesis al Petro, ke li vizitos²⁾ lin la sekvontan³⁾ tagon. Unu tagon poste⁴⁾, kiam Johano vizitis⁵⁾ Petron, la unua petis, ke Petro pruntedonu⁶⁾ al li libron. „Kun plezuro⁷⁾, Petro konsentis, kiam li vidis⁸⁾, kiom admire Johano rigardas⁹⁾ lian libroŝrankon. Momenton poste Petro demandis, ĉu li deziras¹⁰⁾ legi libron de Zamenhof. „Tre volonte“, Johano respondis, „jen¹¹⁾, ĉi tiun libron¹²⁾, „La Rabistoj“, tradukon¹³⁾ de la Majstro¹⁴⁾, mi ankoraŭ ne legis“. Momenton Johano forlasis la ĉambron. Kiam li revenis, li konstatis, ke lia amiko jam legas¹⁵⁾ atente la libron. Li eĉ ne aŭdis¹⁶⁾, ke Petro vokas lin.

1. Niet: *renkontis sin*; hiermee wordt geen wederkerigheid uitgedrukt. Duidelijker blijkt dit in de zin: *ili rasis sin*; niets zegt hier, dat de handeling over en weer geschiedt. Hier moet iets bijkomen, dat de wederkerigheid uitdrukt, bijv.: *ili reciproke rasis (renkontis) sin*, *ili interrenkontis sin*. 2. Niet: *visitos*; door veel luid lezen, met aandacht voor de uitspraak, voorkomt men dergelijke fouten. Niet: *vizitas*; de directe rede is: een gezegde, gedachte, veronderstelling, enz. woordelijk weergeven. De indirecte rede is: alleen de inhoud daarvan weergeven. Bij een indirecte rede gebruikt men in Esperanto dezelfde tijd voor het werkwoord, als bij een directe rede het geval zou zijn. Bij de te vertalen zin is sprake van een indirecte rede; bij directe rede zou de vertaling zijn: *Johano promesis: mi vizitos vin morgaŭ*. 3. Niet: *la sekvantan tagon*; men zegt wel in het Nederlands „de volgende dag“, maar bedoeld wordt, de dag die volgen zal. 4. Ook: *post unu tago*. 5. Niet: *estis vizitante*; verkiest men de samengestelde tijd boven de woordelijke vertaling: *ĉu P. volas pruntedoni al li libron*. 7. Ook: *volonte*. 8. Ook: *vidante*. 9. Niet: *rigardis*; de directe rede zou zijn: *li vidis; J. admire rigardas lian ŝrankon*. Niet: *pririgardas*. 10. Juister dan: *volas*. Zie ook 2. 11. Ook: *vidu, rigardu*. 12. Niet: *ĉi tiu libro*; d.i. een rechtstreekse bepaling, hetgeen duidelijker blijkt als men het onderwerp voorop zet: *Mi ankoraŭ ne legis ĉi tiun libron*. 13. Niet: *traduko*; dit is een bijstelling van het zinsdeel *ĉi tiun libron*; een bijstelling is een aanvulling van een zinsdeel en komt in dezelfde naamval te staan. 14. Niet: *mastro*, d.i. baas, patroon, (bij dieren) meester. *Majstro* betekent: een meester in een kunst, een schepper van een kunstwerk. 15. Voor velen is het juiste gebruik van de tijdsvorm bij de indirecte rede, na woorden als: *vidi, aŭdi, diri*, enz. duidelijk; na *konstati, konjekti, supozi*, enz. wordt veel getwijfeld. Dit vindt zijn oorzaak in het onlogisch gebruik, in deze gevallen, van het Nederlands. 16. Niet: *aŭdas*.

Dem: Kio estas la plej bona traduko por „gestroomlijnd“? Kiel vi opinias pri „vertebrolina“ kaj bobenforma“?

Resp.: „Bobenforma“ ne taŭgas, ĉar „gestroomlijnde“ objektoj plej ofte ne havas formon bobenan. Ankaŭ „vertebrolina“ ne estas ĝusta. „Vertebro“ (wervel) ne havas linion kompareblan kun la ideo celita. „Vertebrarlinia“ estus uzebla. Ni tamen preferas „flulinia“, ĉar la celita ideo estas: kun linioj nerompitaj, sed rektaj kaj en kombino de elegante kurbaĵ, per kio la tuto impresas kiel facilflua (flulinia) objekto.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:

1. Het is al laat; wij moeten eindigen; morgen zetten wij ons werk voort. 2. Toen ons werk geëindigd was, gingen wij naar huis en brachten de avond in huiselijke kring door. 3. Vriend, je hebt het-bij het rechte eind: zonder Esperanto is een intiem contact met buitenlanders onbestaanbaar. 4. Het pakje is losgegaan (*malligiĝi*); wie van u kan mij aan een eindje touw helpen? 5. Het lichaam kan men doden, de geest niet; deze leeft voort in weerwil van alle vervolging. 6. Door alle eeuwen heen hebben grote geesten (gr. geesten = *geniuloj*, *talentuloj*) geleefd, wier arbeid en denken de grondslag vormen van onze huidige beschaving. 7. Wat er ook gebeure, tracht steeds uw tegenwoordigheid van geest te behouden. 8. Wij bezochten het stadhuis, het museum, enige kerken en de dierentuin. 9. De paus is het hoofd der Rooms-Katholieke kerk. 10. Door deze delen wij u mede, dat wij de door u gezonden goederen in goede orde hebben ontvangen. 11. Het congres werd door de burgemeester ten stadhuize ontvangen. 12. Dit bedrag moet binnen drie dagen ten kantore van de ontvanger der belastingen worden voldaan.

Vertaling van opgave 10.

1. Oni sonorigas; iru por vidi kiu estas tie. 2. Bonvolu prunti (pruntedoni) al mi vian fontplumon; mi forĝesis la mian. 3. Dum la germana okupado ni devis interrompi nian laboron por Esperanto (poresperantan laboron). 4. Tuj post la liberigo la Esperanto-movado revigliĝis. 5. Tamen ĝis nun ni ankoraŭ ne sukcesis tute regajni la perditan terenon. 6. Multe da laboro devos esti farata (estas farennda), kaj multe da senilumiĝoj ni ankoraŭ spertos, antaŭ kiam (ol) ni estos atingintaj la antaŭmilitan nivelon. 7. Tial ni apelacias al ĉiuj, kiuj bonvolas (estas bonvolaj) al (rilate al) la internacia lingvo Esperanto. 8. Platonaj amdeklaroj tamen ne utilas al ni; ni bezonas la realan (efektivan) kunlaboron de ĉiuj bonvoluloj. 9. Kiam ni estis promenontaj, ekpluvis; tial ni decidis prokrasti nian ekskurson. 10. Ne ĉiu ĵuganto estas ĵugisto. Aro da arboj ne estas arbaro. Ne ĉiu kantanto estas kantisto. 11. Se vi deziras, ke mi respondu viajn leterojn, vi ĉiam (ĉiufoje) enfermu poŝtmarkon, ĉar ankaŭ mi ricevas ilin ne senpage (donace). 12. Ĉu vi nenion forĝesis? Ĉu vi revenos? (Ĉu vi intencas reveni?) Se vi havas kialon por plendi, diru tion al ni; se vi estas kontenta, diru tion al aliuloj!

Korekto: oni bonvolu atenti, ke la vorto „parolante” en la traduko sur pĝ. 77a, frazo 4a, estas preseraro; ĝi devas esti „parolonte”.

Dem.: Ĉu la vorto „malantaŭen” en la traduko „Rigardante malantaŭen” por „Looking Backward” estas ĝusta? En „Fund. Krest.”, pĝ. 94, l. 25 troviĝas „antaŭe” kun la signifo: al estinta tempo (naar vroeger). Ĉu la uzo de tia formo ne povas erarigi?

Resp.: Via atentigo estas trafa. En la traduko de la koncernata romantitolo la vorto „malantaŭen” ne estas miskomprenbla, sed ĝenerale ĝi povas esti erariga. „Antaŭen” havas du kontraŭajn signifojn: unue, al tio, kio okazis antaŭ ni, do returne, posten; due, al tio, kio okazos post ni, do: en la estontecon. La unua signifo estas pure tempa; la dua abstrakte loka. Stranga paradokso: kio okazis antaŭ ni, estas malantaŭ (post) ni; kio okazos post ni, estas antaŭ ni! Tiajn strangaĵojn eĉ la logiko ne povas solvi; ili ekzistas ankaŭ en aliaj lingvoj. Nederlande oni ja povas diri ion similan: Als je de wind voor hebt, heb je hem ook tegen.

Dem.: Ĉu estas necese uzi kunmetitan verboformon en la traduko de „nadat hij gesproken had”, do: „post kiam li estis parolinta?”

Resp.: La kunmetita formo estas sendube logike pli ĝusta, sed, ĉar la esprimo „post kiam” jam indikas, ke la ago „paroli” okazis antaŭ dua ago, praktike la traduko „post kiam li parolis, . . .” plene sufiĉas.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 15. Vertaal in Esperanto:

JAVA.

De *dessaman*¹⁾ leeft in de natuur, waarvan hij zich afhankelijk voelt. Die natuur is vervuld van machten en krachten, van geesten, goede en kwade. Met al die machten moet hij trachten op goede voet te blijven, want anders is zijn leed niet te overzien: hij zal ziek worden; zijn kind zal sterven; de oogst mislukken; hongersnood zal volgen; zijn vrouw een miskraam krijgen. Hij gelooft aan bovennatuurlijke krachten. In namen b.v. schuilen krachten. Welke naam moet hij zijn kind geven, opdat het niet ziek worde? Getallen kunnen geheimzinnige betekenis hebben. Er zijn woorden, die demonische kracht bezitten en dus niet mogen worden uitgesproken, enz. Dit alles vervult de landman met onzekerheid en angst.

1) *Dessa* = dorp.

Dr. H. Tillema.

Vertaling van opgave 13.

Sub *la*¹⁾ *naturaj aŭ primitivaj popoloj oni*²⁾ *komprenas kutime*³⁾ *la popolojn havantaj*⁴⁾ *ankoraŭ malmulte da evoluinta tekniko*⁵⁾. *Nia intereso por*⁶⁾ *la vivo de ĉi tiuj popoloj — la afrikaj negroj, la indianoj, la eskimoj*⁷⁾, *multaj popoloj de Nederlanda Indio*⁸⁾ *kaj multnombraj triboj*⁹⁾ *en Azio — forte kreskis*¹⁰⁾ *dum la lastaj du jarcentoj*¹¹⁾.

*Kaj tio (okazis) ne nur pro certaj interesoj, sed ankaŭ pro tio, ke*¹²⁾ *la tiom tute aliaj*¹³⁾ *situacioj, kiujn ni trovas ĉe tiuj ĉi popoloj, vekas niajn*¹⁴⁾ *miron kaj scivolon. Per ekzamenado de tiuj situacioj ni lernas pripensi la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de nia propra civilizo.*

Dr. S.H.

Vertaling van opgave 14.

OVER¹⁵⁾ VADERLANDSLIEFDE.¹⁶⁾

Een wet door mensen gemaakt kan door mensen worden te niet gedaan. De vaderlandsliefde, hetzij oosterse, hetzij westerse, is overal dezelfde: vergif, dat¹⁷⁾ het menselijke denken slecht maakt. Zij is een ziekte, en als u begrijpt¹⁸⁾ en u bewust bent, dat zij een ziekte is, zult ge zien¹⁹⁾, dat uw geest daartegen in opstand zal komen. Als in oorlogstijd de gehele wereld over de liefde tot²⁰⁾ het vaderland spreekt, zult u haar onwaarachtigheid herkennen en u zult zich gedragen als een waar menselijk wezen.

Krisnamurti.

1. In de practijk komen de vormen zowel met als zonder lidwoord voor. 2. Ook: *estas komprenataj*, doch de lijdende vorm wordt zoveel mogelijk vermeden. 3. Ook: *ordinare*. 4. Ook: *kun*. 5. Ook: *tekniko*. In de literatuur merkt men op, dat de letter „h” veelal plaats moet maken voor „k”. 6. Ook: *pri*. 7. In de Ned. tekst ontbreekt hier plotseling het lidwoord. 8. Dikwijls vertaalt men „Hindio, welke vertaling o.i. beter past bij Brits Indië, waar de Hindoes leven. Tegenwoordig ook: *Indonezio*. 9. Ook: *gentoj*. 10. Vloeiender dan: *estas kreskinta*. 11. Niet: *centjaro*. Deze samenstelling is verouderd en ook onlogisch. 12. Ook: *ĉar*. 13. Het is beter deze bepaling voor het zelfst. naamw. te zetten, waardoor ze niet van het lidwoord gescheiden wordt. 14. Denk aan de meervoudsvorm! 15. Niet: *betreffende*. 16. Voor „patriotisme” hebben we een goed Nederlands woord: vaderlandsliefde. 17. In het Nederlands liever geen deelwoord. 18. Het is niet nodig de toekomstige tijd in het Nederlands te gebruiken. Verder in de zin komt hij toch tot uitdrukking. 19. Ook: *bemerkén*. 20. Wij spreken niet van „aan”.

Dem.: Ĉu estas necese uzi participon en la traduko de „terwijl ik zät te schrijven” do: „dum mi estis skribanta”?

Resp.: Certe ne. Nur se oni deziras iom emfazi la daŭron de l' skribado, oni povas uzi participon. Generale sufiĉas: „dum (kiam) mi skribis”.

TRA NIA LITERATURO

LA FERA KALKANUMO.

Jack London; tradukis el la angla lingvo G. Saville.

Verko kun revolucie socialisma tendenco. Gi estas jam sufiĉe konata. Cetere, ne estas nia tasko doni detalojn pri la enhavo, nek rezoni pri ĝia literatura valoro de l' originalo. Nin plej interesas ĝia lingva kvalito el Esperanta vidpunkto, do la traduko.

Bona ĝi certe ne estas; ankaŭ ne ĉiurilate malbona. Tiu ĉi traduko havas bonajn flankojn, sed pli da malbonaj. Ekzemple, jen la stilo fluas glate, kaj la enhavo preskaŭ unuarigarde fiksiĝas en la komprenon, precipe en la unuaj ĉapitroj; jen ĝi estas peza kaj stumbla, kaj la leganto nepre bezonas religi por plene kompreni. Oni havas la impreson, ke la tradukinto klopodis plejeble laŭvorte traduki, ĉe tio volante atenti la lingvajn regulojn. La plej gravaj gramatikaj eraroj pro tio estas ne tre oftaj. Krom tio la unupartite flua, aliaparte stumbla tradukmaniero supozigas, ke ankaŭ la kontrolinto, N. Bartelmes, multe kontrolis en la manuskripto, precipe en la komenco. La ceteron li sufiĉe malzorgis!

Unu el la plej ĝenaj malbonoj estas la tro ofte uzitaj pasivaj verboformoj, multloke farantaj la frazojn rigidaj kaj malagrablaj legeblaj. La tradukinto evidente ne kuraĝis anstataŭigi ilin per pli agrablaj kaj fluaj aktivaj formoj. Sed krom la abundaj *-at*, *-it*, *-of*-vortoj, ankaŭ la aktivaj verboformoj ne estas ĉiam ĝuste uzitaj. Por ne-angloj aparte ĝenaj estas la t.n. progresivaj formoj *estas -anta*, *estis -anta*, en Esperanto nepre superflua.

Alia malbono estas, ke la tradukinto ne scias krei unuarigarde kompreneblajn tradukojn por iom malfacilaj vortoj, sed klopodas esprimi iliajn ideojn per flikaĵoj el multe da afiksoj, ekz. *refirmstarigi*, *fortigilkolera*, *umigataj*, *supergeneraligataj*, *kapitalumiĝo*, *ekstersociigataj*, *sangforverŝado*, *malsamaranĝi* k.s.

Tria malbono estas — feliĉe ĝi ne troas — ke la tradukinto ne sciis trovi Esperantan formon por la usonaj idiotismoj. Li tamen trovis solvon: tradukas ilin laŭvorte, kaj en piednotoj ilin klarigas. Ne tre grave; sed imagu, ke tiumaniere oni tradukus verkon kun multe da idiotismoj! Ne restus loko por ĉiuj notoj!

Kaj en tiu ĉi libro la klarigaj notoj pri la teksto tamen jam troas. Ni konsentas, ke pluraj necesas; sed prefere ili trovu lokon en la posto de la libro; sub la paĝa teksto ili ĝenas. Aliaj tamen estas nebezonataj; kaj la tradukinto kelkfoje montras per tiuj notoj, ke li ne alte taksas la komprenpovon de la leganto. Same impresas lia ripetfoja aldono al iu jarnombro: *laŭ Krista* (d.e. *kristana*) *tempkalkulo*. Ni povas ja prave supozi, ke eĉ araboj, ĉinoj, japanoj estas informitaj pri nia kristana tempkalkulo!

Kvankam ne plaĉas, se aŭtoro kvazaŭ ŝonglas per afiksoj kaj vortelementoj por formi nekutime uzatajn vortojn, ni tamen volonte legas iaajn arbitre formitajn vortojn, kondiĉe ke ili estu ĝustloke uzitaj, Tiaj formoj pruvas la elastecon de Esperanto kaj la originalecon de tradukanto aŭ aŭtoro. Al la tradukinto de L.F.K. tamen tute mankas tiu originaleco. Nur unuloke nin surprizis tia trafe uzita speciala formo: *Tiel klare kiel en la lumo de okazoj intaj* (nota sur p. 233). *Inta* ĉi loke pli taŭgas ol longa vorto.

La leganto jam komprenas, ke ni preskaŭ ne sukcesis ĉerpi el tiu ĉi libro rimarkindajn dirmanierojn aŭ gramatikajn formojn. La esprimoj, kiujn ni prezentas ĉi sube, estas ĝenerale pli malpli evitindaj aŭ eĉ nepre eraraj:

Trimaniera, do nekonsekvencan traduko de unu sama signifo: *tro kolosa*, por *ke estus* (21—25); *tro terura*, ol *ke ĝi povu* (81—25); *tro simpla*, por *ke li estu* (192—4). Adverbo ĉe substantivo: *plej proksimo* (251—15); *tre malmulton* (60—3); *plej bono* (197—27).

Kriplaj frazoj: *ĝi estis*, *kion mi povus nomi* (82—6); *kion mi trovis*, *estis* (97—18).

Manko de akuzativo: *mano en mano* (48—17); *ŝultro ĉe ŝultro* (166—21).

Erara uzo de *po*: *10 horojn potage* (96—23); *unu cendo po litro* (137—22).

Erara uzado aŭ manko de afiksoj: *venonto (-eco)* (20—15); *senĝeno (-eco)* (20—15); *ĝentilecoj* (25—14), *respondecoj* (84—23); *senkompatema* (*senkompata* aŭ *nekompatema*) (36—52); *neerarebla* (217—13), *malaperebla* (195—8), *nemortebila* (252—1).

Kial *priservi*, *prisonĝi*, *priatenti*, *prirevi*?

Gena estas la nenionsignifa aldono de *e* en la oftaj *tiele*, *kiele*, *tele*. Kaj ankoraŭ pli ĝenas la kontraŭfundamentaj *alitel*, *tie kaj alie* (*alioke*), *tien kaj alien* (*alioĉen*). Krome ni notas: *repagas onin pri nia* (ons voor onze) *sufurado* (93—6); *laŭŝtupe* (*laŭgrade*) (133—10); *demandi rekten kaj malrekten* (134—28); *jus anstataŭ ĝuste* (ofte); *la iomon*, *kion li sciis* (41—31); *la kiamo de nia geedziĝo* (87—18) (tre

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

De stofzuiger doet dus dienst als luchtverplaatser. Als er door gat E lucht aangezogen wordt, (dan) zal er ook door het gat A lucht toestromen. Sluit ik nu op opening A een slang met mondstuk aan, dan zal bij het mondstuk lucht naar binnen stromen. En nu is het alleen nodig, dat die instromende lucht zo'n grote snelheid heeft, dat ze de stofdeeltjes meesleept.

Als je even stofzak D wegdenkt, dan kan je je voorstellen, dat de lucht met de stofdeeltjes bij K er weer uitgeblazen wordt.

Om dat nu te voorkomen wordt de stofzak vóór de waaiers geplaatst. Deze zak is van een zeer fijnmazig weefsel gemaakt. De mazen zij zo klein, dat ze nagenoeg alleen de lucht doorlaten; het stof moet dus achterblijven. De zak doet dus eigenlijk dienst als luchtzeef of luchtfilter.

Als je een tijdje stofzuigt, volgt daar dus onvermijdelijk uit, dat het stof zich tegen het weefsel van de zak samenpakt. De filter raakt dus op de duur verstopt.

De lucht ontmoet op 't laatst zo'n weerstand door het weefsel, dat ze het bij wijze van spreken opgeeft om door te stromen. De ventilator is niet meer bij machte om de lucht er door te zuigen en als er geen lucht meer aangezogen wordt, ondanks het draaien van de waaiers, dan is het middel om het stof mee te nemen dus afwezig. Het gevolg is, dat mijn vrouw zegt: „Man, kan je niet even de stofzuiger nazien. Hij doet het zo slecht.” V.: Nou snap ik het. Ik moet dus die zak eigenlijk iedere keer na het zuigen leegmaken.

M.: Juist, als je dat nu maar begrijpt, dan heb je altijd een puike stofzuiger. Maar denk er om; niet alleen leegmaken, doch je moet ook de zak uitkloppen.

La senpolvigilo do funkcias kiel aertransportilo. Se tra truon E aero estas malblovata, (tiukaze) ankaŭ tra truon A la aero alfluas. Se oni do konektas flekseblan tubon, provizitan per buŝo, kun la aperturo A, ankaŭ tra la buŝon la aero enfluas. Kaj nun necesas nur, ke la enfluanta aero havu tiom grandan rapidon, ke ĝi kuntrenas la polvojn. Se vi nun momenton imagas, ke polvosako D estas for, vi povas prezenti al vi, ke la aero kun polvoj estas elblovata ĉe K.

Ĝuste por eviti tion la polvosako troviĝas antaŭ la padelradoj.

Ci tiu sako estas fabrikita el teksaĵo kun tre malgrandaj maŝoj. La maŝoj estas tiom malgrandaj, ke ili tralosas preskaŭ ekskluzive la aeron; la polvo do devas resti. La sako do fakte funkcias kiel aerkribrilo aŭ aerfiltrilo.

Se vi dum certa tempo senpolvigas (malblovas polvon), rezultas el tio neeviteble, ke la polvoj amasiĝas sur la teksaĵon de la sako. La filtrilo do post certa tempo okstrukiĝas.

La aero fine traŝas tiom grandan reziston tra la teksaĵo, ke ĝi, metaforde, rezignas la trafluadon. La ventolilo ne plu kapablas malblovi tra ĝin la aeron kaj, se la aero ne plu estas malblovata, malgraŭ la turniĝado de la padelradoj, la perilo por kunpreni la polvon estas for. La rezulto estas, ke mia edzino diras: „Edzĉjo, ĉu vi havas okazon ekzameni la senpolvigilon. Ĝi funkcias tre malbone”.

Nun mi komprenas. Mi do ĉiun fojon post la senpolvigo devas malpleniĝi la sakon.

Ĝuste, se vi tion bone komprenas, vi ĉiam havos bonegan senpolvigilon. Sed atentu; ne nur malpleniĝu, sed vi ankaŭ batpurigu ĝin.

trafel); *li bridis ilin reen al la faktoj* (321—20); *tielgrade (tiugrade)* (50—2); *ĉiamigo*; la sensencaĵon: *mi konis kaj estis konanta lin* (77—26); *bataletoj estis batalataj* (182—13); *virpantalona paro* (!) (24—19) *memvidinto* (251—14) (oni ja ĉiam vidas mem!); *ŝi komencis june* (206—28); *malbonanonce (aŭgure)* (218—32); *pro kion mi estus dironta* (200—23); *tiomajn (?) profitojn* (185—24). Kaj kion signifas la usonismo *unu kaj ĉiuj*, kiun ni trovis eĉ kvarloke? Evidente la tradukinto opinias la homon facile disigebla, ĉar iuloke li diras: *rekolektu vin* (108—12). Malbele sonas *estas bone sciate* (21—21). Laŭ la tradukinto oni bezonas por akiri sciencojn nur *trairi universitaton* (68—32). Kaj homo finance forta estas laŭ li *homo bone situita* (100—11).

Aliaj eraroj oftas en la tempoj en dependaj propozicioj, en numeraloj. en uzo aŭ neuzo de l' artikolo, en neĝustaj vortoj k.m.a.

El la pliparte nebezonataj neologismoj ni menciu nur *mercenarulo, mejhemo, hendi-kepo, bradsajdo, guvernoro*.

Malgranda stilmonstro estas: *Kaj krom tio estis tiu ioma kaj nemalrekonebla iomo da mallerto en liaj manieroj* (90—20).

NOMINATIVO AU ĀKUZATIVO!

Adjektiva komplementa propozicio estas parto de frazo, kiu komplementas, do pliklarigas, alian frazparton. Ĝi komplementas jen la subjekton (La persono, *vidinta la krimon*, informis la policon), jen la objekton (La polico trovis la personon, *vidintan la krimon*), sed ankaŭ ian adjekton (Mi parolis kun la persono, *vidinta la krimon*).

Adjektiva komplementa propozicio estas ĉiam facile trovebla, ĉar oni ĝin ĉiam povas anstataŭigi per: *kio* aŭ *kio*. . . (La persono, *kio vidis la krimon*, informis la policon. La polico trovis la personon, *kio vidis la krimon*).

El tiu fakto multaj esperantistoj erare konkludas, ke tia propozicio, ĝustedire ĝia adjektiva parto (ĉi fraze: *vidinta*) ĉiam devas esti nominativa. Ili do kredas, ke la klarigo *kio vidis* sufiĉe pruvas, ke la anstataŭata vorto havas nominativan signifon, ĉar la vorto *kio* estas subjekto, nepre postulanta nominativon.

Kaj tamen ili malpravas! Certe, oni povas klarigi tiajn propoziciojn per *kio* aŭ *kio*. . . , kaj tiam formiĝas nova subjekto. Sed, se ni ne uzas *kio* aŭ *kio*, ne formiĝas nova subjekto kaj la koncernata propozicio nepre postulas la saman kazon, kiun havas la vorto, kiun ĝi komplementas. Do: adjektiva komplementa propozicio, apartenanta al la subjekto, estas nominativa same kiel la subjekto mem. Sed adjektiva komplementa propozicio, apartenanta al la objekto (aŭ pli ĝustedire al la rekta komplemento) estas akuzativa, same kiel la pasiva objekto mem. Oni rimarku, ke adjektiva komplementa propozicio estas deklinacienda laŭ la sama regulo kiel apozicio; esence ĝi estas tre parenca al apozicio; oni komparu (adj. kompl. prop kaj apozicio estas kurzivaj):

Oni riproĉas al ni, *esperantistoj*, ke. . . . Ni, *esperantistoj*, scias, ke. . . .

Oni riproĉas al ni, *sciantaj Esperanton*, ke. . . . Ni, *sciantaj Esperanton*, scias, ke. . . .

Oni ne venkos nin, *sciatajn Esperanton*.

Rimarku, ke ankaŭ apozicio estas ĉiam anstataŭigebla per *kio* aŭ *kio estas* (Oni ne venkos nin, *kiuj estas esperantistoj*).

Trafa pruvo, ke la klarigo per *kio estas* neniel helpas nin, estas, ke ja ĉiu ajn adjektivo estas tiumaniere klarigebla! La simplan frazon: mi havas bonan libron — ja estas ŝanĝebla en: mi havas libron *kio estas bona*.

Ankoraŭ aliamaniere oni povas pruvi la ĝustecon de l' akuzativo en tiaj propozicioj: En Esperanto oni rajtas uzi la adjektivan antaŭ kaj post la substantivo. Do same bonaj estas: Ili vidis la preterflugantajn nubojn — kaj: Ili vidis la nubojn preterflugantajn.

Sed ne sencele oni uzas la duan formon!

En la frazo: Ili ekvidis la nubojn, preterflugantajn profunde sub ili (F.K., 53—9) — la adjektivo *preterflugantajn* staras ne senmotive post la substantivo *nubojn*. La motivo estas, ke la vorto *preterflugantajn* havas post si propran komplementon (*profunde sub ili*), kaj la stilo kaj tuja kompreno postulas, ke tiu adjektivo staru post la substantivo. Sed gramatike egale bona, kvankam stile kritikinda, estas: Ili ekvidis la profunde sub ili preterflugantajn nubojn. En tiu ĉi formo, tamen, oni ne povas ne ekkoni la ĝustecon de la akuzativo.

En tiu ĉi afero ne temas pri persona opinio, sed pri logika lingva regulo. En „Esperanto Zamenhofa” d-ro P. Corret iam klarigis la aferon laŭ multaj ekzemploj de Zamenhof mem, certigante, ke vane oni serĉus en ĉiuj zamenhofaj verkoj eĉ unu devion de tiu regulo.

Kaj krom tio oni rimarku, ke, se ni regule uzus nominativon, oni povus kelkfoje kaŭzi miskomprenon. Unue, miskompreno estiĝus pro la fakto, ke la adjektiva adverba komplemento postulas nominativon. Oni komparu:

Mi aŭdis la personon, defendantan tiun opinion (kio defendis tiun opinion). Mi aŭdis la personon defendanta tiun opinion (kiam li defendis tiun opinion).

Kaj due: En la frazo: Mi respektas la opinion de tiu homo, tute sinceran — oni tuj komprenas, ke *sinceran* rilatas al *opinion*. Se ni skribas *sincera*, do nominative, la vorto rilatus ne al *opinion* sed al *homo*.

La akuzativo do estas bezonata, unue por diferencigi atributivan kaj predikatan signifojn; due por indiki al kiu vorto la adjektivo rilatas.

DE LA ADMINISTRACIO.

Kelkaj abonantoj ankoraŭ forĝesis pagi sian abonon. Ili bonvolu fari tion plejeble baldaŭ. Ankaŭ la sekcioj, kiuj zorgas pri la abonmonoj de siaj membroj, plenumu tiun aferon sen plua prokrasto.

